

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Ing-ro R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I * N-RO 16

MONATA ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

MAJO 1933

J. Penndorf: Pra-Esperanto. (Fino.)

Post du senĝojaj jaroj de studado en Moskvo, somere 1881 reveninte hejmen, por poste daŭrigi sian studojn ĉe la universitato Varsovia, la junulo sciigis de la patrino, ke la patro (en bona kredo, ke tiel li „savos“ sian filon) bruligis liajn manuskribaĵojn ĉiujn. Sed fakte la perdiĝo estis ne tro grava; li ja ĉion memoris parkere kaj fervore refaris sian verkon. Sur kajeroj de aŭgusto 1881 reaperas preskaŭ tiu sama lingvo kiel en 1878. La bela balado de Heine estis jene⁵⁾ tradukita el germana:

II A.

Mo bella princino il sonto vidá
Ko zuoj malseŝaj e palaj,
Sul dillo, sul verda ni koe sidá
Il arnoj amizaj e kalaj.
5 „La kron' de ta padro fio pu mo esté,
La ora, la redža ra sello!
La skepro diantiza, rol mo ne volé,
Tol mem koj volé mo, ma bella.“
„To et ne estebla“, ŝo palla a mo,
10 „Kor et si la tomo kuŝe mo a
E koj i la nokto vioné mo a to,
Kor tol fe prekale amé mo!“

En definitiva Esperanto de Zamenhof la poemo tekstas jene (Fundamenta Krestomatio, p. 326):

II B.

En sonĝo princinon mi vidis
Kun vangoj malsekaj de ploro, —
Sub arbo, sub verda ni sidis,
Tenante nin koro ĉe koro.
6 „De l' patro de l' via la krono
Por mi ĝi ne estas havinda!
For, for lia sceptro kaj trono —
Vin mem mi deziras, aminda!“
„Ne eble!“, si al mi rediras.
10 „En tomo mi estas tenata,
Mi nur en la nokto eliras
Al vi, mia sole amata!“

Krome mi aldonas la germanan originalon.

II C.

Mir träumte von einem Königskind
Mit nassen, blassen Wangen;
Wir saßen unter der grünen Lind'
Und hielten uns liebend umfangen.
6 „Ich will nicht deines Vaters Thron
Und nicht sein Szepter von Golde,
Ich will nicht seine demantene Kron',
Ich will dich selber, du Holdel!“
„Das kann nicht sein!“, sprach sie zu
10 „Ich liege ja im Grabe, [mir,
Und nur des Nachts komm ich zu dir,
Weil ich so lieb dich habe.“

„Estis jam progreso“, juĝas E. Privat pri la teksto A; ni esploru pli precize kaj detale!

Unuavide tuj frapas la okuloj kelkaj super signoj: ŝ (malseŝaj l. 2, kuŝe l. 10, ŝo l. 9), ž (el la pola alfabeto) zuoj l. 2, redža l. 6. La lasta vorto kongruas kun la nuna, reĝa, la antaŭlasta estas la franca „joue“, poste anstataŭigita per la germana „jewe“, certe por eviti kolizion kun la radiko „ju-“ (france „jour“). La litero ž en 1881 ne jam ekzistas. Anstataŭ „songo“ (france „songe“) ni legas surprize l. 1 „sonto“. La skribmaniero „padro“ l. 5 por „patro“ memorigas pri la itala (padre).

La vortformo „skepro“ l. 7 (greke „skeptron“, ruse „skipetr“ — Esperante „sceptro“) laŭŝajne celas pli facilan elparoleblon; la komencaj sonoj sc ja estas penigaj por kelkaj nacioj. La substantivo „armo“ l. 4 (verŝajne identan kun la germana „Arm“) poste forigis la samsenca latina-franca „brako“; ĉar en Esperanto la radiko „arm-“ havas alian signifon. Ankaŭ „sello“ l. 6 (latine sella) ŝanĝiĝis en „seĝo“; „dillo“ l. 3 (= latine „tilia“, itale „tiglio“, france „tilleul“) tute egalas al la esprimo „Linde“ de la germana originalo C, sed B tekstas malprecize „sub arbo“. Cetero iom strango aspektas la duobla ll en „sello“ kaj „dillo“; ŝajne ĝi plaĉis tiutempe al Zamenhof; ĉar ni retrovas ĝin en „bella“ l. 1, 8 kaj „palla“ l. 9.

Sed aliaj vortoj nepre vidigas la nunan formon, ekz. „nokto“ l. 11, „tomo“ l. 10, „princino“ l. 1 (kun la sufikso -in por la virina sekso), „kron“ l. 5 (sen finaĵo laŭ regulo 16!). Sed priatentu la ĉeĝaĵojn: ĉiuj substantivoj nun havas la finvokalon o (jam ne e) kaj ricevas en pluralo aldonitan i-on, ekz. „zuoj“ l. 2, „arnoj“ l. 4.

Same la adjektivoj finiĝas per -a, respektive per -aj: bella l. 1, 8, verda l. 3, ora l. 6, redža (= reĝa) l. 6, diantiza l. 7, estebla l. 9; malseŝaj, palaj l. 2, amizaj, kalaj l. 4. Lia signifo estas ĝenerale klara; nur „seŝa“ anstataŭ „seka“ (do Zamenhof komence preferis la virinan, poste la viran formon de la franca adjektivo „sec sèche“). Iom malfacile estas interpreti la vorton „kala“ l. 4. Oni ja ne devas ĝin derivi de la nuna substantivo „kalo“; pli vere ni memoras pri la latina radiko „calid-“ (itale „caldo“, france „chaud“ = varma), nuntempe pro la esprimo „kolorio“ ree internaciigita; cetero la origina teksto C estas nek en B nek en A laŭvorte tradukita.

„Amiza“ l. 4 kaj „diantiza“ l. 7 vidigas sufikson -iz (kiun oni nun okaze renkontas en teknikaj falkverboj ekz. elektrizi, nikelizi — krom „karaktelrizi, organizi“); eble „amiza“ egalas al „amriĉa, amplena“. Kaj „diantiza“ certe ne deriviĝas de la nuna substantivo

„dianto“, sed pli vere de „diamanto“; do „diantiza skepro“ (A 7) memorigas pri „demantene Kron“ (C 7 = diamanta krono). En la vorto „estebla“ l. 9 estas kunigitaj la verba radiko „est-“ kaj la sufikso „-ebla“; en B tekstas „ne eble“, do la nura sufikso memstarigita laŭ nuna kutimo.

Plue tre gravaj estas la pronomoj. Evidente „mo“ l. 1, 7, 8, 9, 10, 11, 12 estas identa al „mi“, „no“ l. 3 = „mi“, „ŝo“ l. 9 = „ŝi“. Do la personaj pronomoj finiĝas per -o (kiel ordinaraj substantivoj). Anstataŭas la finvokalo -a ĉe la (adjektivaj) pronomoj posedaj: ekz. „ma“ (bella) l. 8 = „mia“ (belulino), „ta“ (padro) l. 5 = „cia“ aŭ „via“ (B) patro. Laŭ „ta“ ni senhezite konjektas la personan pronomon „to“ = tu (latine, itale, france), du (germane) kaj analoge por la nuna Esperanto „ti“, „tia“; sed anstataŭas la malofta „ci“ (kial?, certe por eviti kolizion kun la montra „tia, tio“). Fakte (A l. 9) ja troviĝas „to“, sed la senco ne akordas; ĉar la germana originalo C tekstas: „Das kann nicht sein“, laŭvorte: „tio ne povas esti“ aŭ „tio ne estas ebla“. Do „to“ devus signifi la saman, kion la nuna „tio“ — tre strange! Ankaŭ la vorteto „et“ — almenaŭ por mi — ne estas sufiĉe klarigebla; cetero ĝi ja aperas ankaŭ l. 10. (Ĉu eble substas la mallongigita latina adverbo „etiam“, do = „ĉ“). Certe interrespondas „a to“ (A l. 11) kaj „al vi“ (B l. 12), same „a mo“ (A l. 9) kaj „al mi“; do la dativo estis esprimata per a, kiel poste per „al“. Plue, „to“ (A l. 8, 12) estas sendube akuzativo; pruvigas per „vin mem“ (B l. 8). Konsekvence „ro“ (A l. 7) estas la akuzativo de „ro“, pronomo de la tria persono virseksa en singularo, kaj „ra“ (A l. 6) la adjektivo aŭ poseda pronomo; komparu „la redža ra sello“ (A l. 6) kun „lia sceptro kaj trono“ (B l. 7). Rezultas jenaj pronomaj formoj: a) personaj: mo, to, ro, ŝo — aliĝas (el l) so (= si); no (lat, nos, it, noi, fr, nous) — ni kompletigu per „vo“ (lat, vos, it, voi, fr, vous); b) posedaj: ma, ta, ŝa — sa; na, va.

Cetero mi atentigas pri la grava punkto, ke la personaj pronomoj jam ricevis specialan finaĵon por la akuzativo, sed la adjektivoj kaj substantivoj ankoraŭ mallhavis; tio evidentiĝas el „bella princino“ (A l. 1) kontraŭ „princinon“ (B l. 1).

La verbformoj estas ankoraŭ finakcentataj, ekz. „vidá, sidá“ (l. 1, 3) konformaj al „vidis, sidis“ en la teksto B. Do la finaĵo -á signifiĝas la pasintan tempon (difference de la teksto I — 1878 —, kie „está, debá“ rilatas al la estanta tempo). Plue: „esté l. 5, volé l. 7, 8, kuŝé l. 10, vioné l. 11, amé l. 12“ enhavas la komunan finaĵon -é, karakterizan por la estanta tempo. Verbformoj de l' estanta tempo bedaŭrinde ne troviĝas.

Sed restas unu malklaraĵo. Legiĝas en linio 9: „ŝo palla a mo“; laŭ la germana originalo estas la senco; „ŝi parolis al mi“. Do evidentiĝas la bone konata radiko itala-franca „parl-“; „pall-“, „parol-“: la duobla ti-

⁵⁾ Privat, Vivo de Zamenhof, pĝ. 29.

tero ĵ ŝajnas pardonebla pro la supre citita prefera amo de juna Zamenhof al tia sono. Ankaŭ la finvokalo -a precize egalas al la germana originalo koncerno la pasintecon; en B ja linio 9 tekstas: „ŝi al mi rediras“, sed verŝajne la verkinto elektis la estantan tempformon nur pro la ritmo kun linio 11: „diras“. Sed trege nin mirigas la fakto, ke la vorto „palla“ ne havas la akcentsignon super la finvokalo -a kaj la versrimo nepre postulas la akcentadon de la antaŭlasta silabo. Ĉu ni rajtas supozi, ke la iama leĝo pri la finakcentataj verbformoj tiukaze estas forlasita favore por la universala regulo (10) pri akcentado de la nuna Esperanto? Kvankam rezultas ia maloportunaĵo; ĉar tiunmaniere verbformo kiel „palla“ (= parolis) koincidas — krom la nur skriba diferenco — kun la adjektiva formo „pala“ l. 2. Ĉu ni konstata unufojan escepton? Apenaŭ kredinde! Certe, se la aŭtoro volis ĝin ĝeneralligi, t. e. rezigni pri la privilegio finakcentataj verbformoj, li necese devis krei novajn verbformojn; ĉar la simplaj vokaloj (a, e) jam alifloke estis okupitaj. Je tia stato, ĉu estas tro riskeme supozi, ke Zamenhof aplikis por la verbformoj la aldonitan literon s, jam ne bezonatan, por karakterizi la pluralon de substantivoj kaj adjektivoj? Do teorie rezultas la eblaj finaĵoj -as, -es, -is, -os, -us, kiujn en la definitiva Esperanto-lingvo li uzis ĉiujn por la verboj, kun escepto de -es, jam destinita por vico de la tabelaj pronomoj (i-es, ki-es, ti-es ktp.).

Ĝi la prepozicio troviĝas la plej oftaj, kvankam iom strangforme. Ekz. ĵ la nokto l. 11 = „en la nokto“; do „ĵ“ anstataŭas la iaman (l. 3) „in“ (familje); ĉar intente „-in“ estiĝis sufikso (princino l. 1). Plue „il“ sonito l. 1, „il“ armoj l. 4 tuj evidentiĝas per disigo: „il“ = i l’; ni ja nuntempe kutimas en Esperanto dise skribi la prepozicion kaj la apostrofitan artikolon pro pli granda klaro, sed komparu en la itala lingvo „nel“, en la germana „im, ins“. Forlasi la vokalon de l’ artikolo permesas Zamenhof preferi post prepozicioj finiĝantaj per vokalo (laŭ regulo 16 kaj lingva respondo 45/46 en la kolekto de W. Lippmann). Fakte en la lingvo de 1881 pli multaj prepozicioj vokale finiĝas ol nun. Anstataŭ „l“ la aŭtoro poste preferis la grekan (ankaŭ francan) formon „en“, certe por eviti eblan konfuziĝon kun la infinitiva finaĵo „i“. Same mi interpretas „sul“ l. 3 = „su i“ = „sub la“, „pu“ l. 5 = „pour“ (franca), do „pu mo“ = por mi; „ko“ l. 2 = kon (l. 4 „komunigare“) = nun „kun“. Sekve „koe“ l. 3 = „kune“; rezultas -e kiel finaĵo de adverbo.

Do ni iomete divenas la (cetero por mi enigman) vortojn l. 12 „se prekale“: estas du adverboj; en la teksto B troviĝas ĉe la sa-

ma folko nur la adverbo „sole“; ĉu la senco en A povas esti „tre preferi“? Fakte la radikilo „prefer-“ en Universala vortaro tradukiĝas pole per „przekładać“. Plue „koi“ l. 8, 11 (eble laŭ la dua parto de la franca esprimo „no... que“) signifas „nur“; „koi“ i la nokto“ tekstas en B l. 11 „nur en la nokto“.

La vorteto „kor“ l. 10, 12 certe estas la kaŭza konjunkcio = ĉar (en la germana originado ni legas l. 10 „ja“, l. 12 „weil“). Evidente ĝi devenas el la franca lingvo: ĉar, laŭ Esperanta skribmaniero „kar“; ĥo vel, ekzistas jam alisenca radikilo „kar-a“, do Zamenhof aligis la vokalon kaj kreis „kor“. Sed en la definitiva Esperanto ĉe ĉi tiu formo ne estas taŭga, ĉar tiu radikilo „kor-“ havas la senco de la latina vorto „cor“, franca „cour“, itala „cuore“; sekve nun Zamenhof aligis la komencan literon, almetante al la origina vorto franca la supersignon: naskiĝis „ĉar“. — Tre interesa estas la konjunkcio „e“ l. 2, 4 (= france „et“, itale „e(d)“), jam senhezite uzata, kiun poste amikoj kaj — malamikoj refoje volis altrudi al la majstro, sed li malaprobis la aplikon de gramatikaj vortfinaĵoj unuvokalaĵaj (e, i) kiel memstaraj vortoj; do li enkondukis la grekan konjunkcion „kaj“, ja multe malluigitan. — Kontraŭe mi ne povas klarigi la vortetojn „et“ l. 10. Oni ja supozas „i la tombo“ = „en tombo“ B, same kiel l. 11 „ĵ la nokto“; kien celas la litero s antaŭ i („ĵ la tombo“)? Kiu solvos la enigmon? Ĉu eble subestas eraro de la skribinto aŭ publikiginto?

Plue estas duba la vorto „fio“ l. 5, laŭŝajne substantivo de la radikilo „fi-“. La interjekcio „fi“ ĵ troviĝas en Universala ekzercaro § 26, antaŭlasta frazo: „Fi, kiel abomeno!“ kaj estas klarigita per la franca „fi donc!“, la angla „fie!“, la germana „pfui!“, la rusa „fii!“, la pola „fie!“. Sed la esprimo „la krono de via patro por mi estas abomenaĵo“ estus preskaŭ terura traduko de la ĉarma teksto germana: „mi ne volas „ekhavi“ la kronon de via patro“; ankaŭ en B la vortoj sonas pli milde: „ĝi ne estas havinda“.

Resume ni konstatas: la progreso laŭ la du lingvaj specimenoj, la unua el la jaro 1878 kaj la dua el 1881, estas tre rimarkinda. La tradukita ballado de Heine markas kvazaŭ la mezon de l’ evoluo de la primitiva al la definitiva Esperanto.

Laŭ la ritmo legante, oni ekkonas, ke la du vokaloj ia, io estiĝas nur po unu silabon: diantiza l. 7, fio l. 5, vioné l. 11; komparu: „naces, familje“ en la teksto l.

La rimoj de la dua strofo estas parte malfortaj (esté: volé), ĵ parte nepuraj (sello:

*) Aŭ ĉu eble samsenca kun la adverbo „for“ (B l. 7)?

bella), tiuj de la tria strofo — bro unutonaj (mo: to, mo: mo). En la nova redaktaĵo B la rimoj ja estas ne riproĉindaj, sed ĉiuj versoj finiĝas per trofeo (—) laŭ la natura karaktero de Esperanto. Kontraŭe la pli frua teksto A imitas fidele kaj precize la germanan originalon, ĉar alternas akcentataj kaj ne akcentataj finsilaboj. —

Dum la postaj ses jaroj (1881—1887) Zamenhof laboris ĉiutage, plibonigante kaj provante sian lingvon. Laŭ la letero al Borovko, multon li devis „ĉirkaŭhaki, anstataŭi, korekti kaj radikale transformi... Tiaj objektoj kiel ekzemplo la universala prepozicio „je“, la elasta verbo „meti“, la neŭtrala sed difinita finiĝo „-ai“ ktp. kredinde ne enfalis en lian kapon teorie. Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis riĉaĵo, montriĝis en la praktikado senbezona balasto; ĵ forjetis ĉe kelkajn nebezonaĵojn sufiksojn.“

Laŭ E. Privat (Vivo de Zamenhof, p. 30) „dum tiu puriga laborado foriĝis el la lingvo kelkaj latinaj radikoj kiel ekzemplo „anno“ kaj „diurno“ kaj anstataŭiĝis per „jaro“ kaj „tago“. Efektive — ano jam estis sufikso kun senco malsama, kaj aliflanke Zamenhof jam ne volis vortojn kun duobla litero. „Diurno“ tre malbele sonis en kometitaj vortoj kiel „ĉiudiarne“ aŭ „diurnmeze“ kaj ankaŭ estis ne sufiĉe internacia. Same plibelsona „kaj“ el greka lingvo anstataŭis „e“ latinan, ne sufiĉe klaran al oreloj, por dividi frazojn sen konfuzo.“

Tial okazis, ke poste eksteruloj, kiuj volis „perfektiĝi“ la vonton, ofte nur revenis al unua formo, kies maltaŭgecon al la majstro vidigis multjara praktikado. Senĉese polurante per provado, li fine sukcesis, ke lia lingvo „iompostiom malpezigiĝis, pli rapidis, ricevis sian vivon, sian spiriton, sian karakteron propran, ke ĝi jam fluis flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.“

Laŭ la esploritaj specimenoj de primitiva Esperanto, mi ja iomete ekkonis tiun penigan laboron de la majstro. Bedaŭrinde ne sufiĉa materialo estis al mia dispono, kaj mi mem ne povis ĉion klarigi senreste. Eble aliaj kompetentuloj kapablas pliŝustigi kaj kompletigi miajn rezultojn. Precipe estus grave eksciigi, ĉu ekzistas ankoraŭ la „kajeroj“, menciitaj de E. Privat (Vivo de Zamenhof, p. 29), aŭ aliaj skribaĵoj antaŭ la apero de la unua libro (1887). La poemo „mia penso“, naskiĝinta dum la studentaj jaroj (Privat, Vivo de Zamenhof, p. 32), ja estas konata nur en la definitiva Esperanta formo (Fund. Krestomatiko, p. 321).

Do ĉiun, kiu povas havigi taŭgan materialon aŭ novajn ideojn por la scienca esploro kaj eventuala historio de l’ evoluo de Esperanto-lingvo, mi kore petas pri afabla kunhelpo.

JULIO BAGHY: DANĜERA VOJO.

La celo de mia artikolo ne estas riproĉo, direktata al certaj personoj aŭ gazetoj, kiuj preferas la laŭmodan pliriĝigon de niaj vortrezoro kaj gramatika fundamento. Por riproĉi mi havas tro multe da respekto kaj amikeco al ĉiu kulturanto, perluma batalanto. Mi bone konscias pri tio, ke ĉiu donas la plej valoran el siaj kvalitoj al la komuna laboro por la komuna celo. Bonvola ambicio, amo al la ideo kaj lingvo, talenta kremo por atingi absolutan perfektecon karakterizas la laboron de niaj literaturistoj. Senescepte ĉiu celas la samon, sed laŭ di-

versaj principoj. Ili estas artaj principoj, kaj ĝuste pro la arca karaktero de la principoj ni, literaturistoj, emas forgesi ofte pri la realeco, forŝiras nin de la tero kaj, vivante en la fora sfero, ni ne rimarkas, ke nia laboro jam estas troa, jam transpaŝis la limojn de bezono, kaj anstataŭ bono ĝi fruktas ĉe malutilon. Estus dezirinde ĉirkaŭrigardi kelkfoje sur la forlasita tero.

La aserto, ke la enkonduko de la novaj vortoj prezentas nemian danĝeron por la komencantoj, estas imagita vero. Ni ne havas specialan kaj abundan materialon literaturan

por la komencantoj, kaj tial ili aĉetas por lego tion, kion oni proponas al ili. La entuziasma komencanto fervore komencas la legadon. Ne, nur li komencas, sed li trovas tiam vortojn jam en la antaŭparolo de simplaj legolibroj, antologioj, kiujn li vane serĉas en sia vortaro. La entuziasmo restas, sed lian fidon jam ekmodas vermo, la dubo pri facileco de la libro. Li serĉas novan venkon por kontentigi sian fervoremon, kaj jen denove li renkontas amason da vortoj, pri kiuj eĉ malnovaj, spertaj samlingvanoj ne povas doni klarigon, kaj tiamaniere

la literaturo mem perdas unu ĉuanton aŭ ĝi gajnas tian kulturanton, kiu havas neman respekton al la lingvo, ĉar tian respekton ne inkulis en ĉi tiu legita materialo. Mi konas pli ol unu el malnovaj adeptoj, kiujn seniluziigis la ĉiama renkonto al novaĵoj kaj ili forlasis la movadon aŭ, restante ĉe la standardo, ili simple neglektas la literatur-ajojn. Tute sincere mi konfesas, ke ankaŭ mi mem inklinas sekvi ilin, kiam post 22-jara uzo kaj lernado de la lingvo dum legado mi devas manipuli per vortaroj angla, franca, hispana, itala, germana por kompreni la verkon aŭ simplan antikolon, ĉar la serĉataj vortoj troviĝas nek en la Plena Vortaro de SAT, nek en la pli ampleksa vortaro de Boitrac. Mi povas aserti, ke estas tre seniluziige konstati nian mal- scion post tiom da penado. Ne mirinde do, ke vekigis en kelkaj malpli firmaj, malpli obstinaj adeptoj — la sento de veneco.

Kiu estas kulpa? Pli malpli ni ĉiuj estas kulpa, ĉar ni forgesis pri la ekzemplo de la unuaj pioniroj, pri iliaj fortostreĉo en la vortformado, kaj respekto al la lingvo mem. Kion fari? **Halti sur la danĝera vojo kaj revizii la principojn de la laboro literaturo.** Kiamaniere? Per objektiva konsidero de la realeco kaj per bonvola reciproka helpo.

Mi havas kelkajn proponojn, kiuj celas bridi la groornamadon de la lingvo kaj fari ordon en la hodiaŭa haoso. Ĉar estas jam haoso. Ni perdis la simplecon de la grammatiko per diversmaniere klarigitaj sintaksaj reguloj. Ni perdis la facilecon de la lingvo per la troniĉa vortaro, — pli ĝuste esprimite, per la neracie riĉigita vortaro. Ni perdis iom el la originala belsoneco per la enkonduko de trolongaj novaj vortoj kaj tiaj vortkunmetoj, kiu ebligis la amasiĝon de pluraj konsonantoj (ambulatorio, antropofago, eskvizita, prestidigitii; teatrsminko, korbportanto, kantkreo, kankrmaniere). En miaj proponoj mi ne postulas ion neeblan, ion nepleneblan. Mi respektplene petas ilian objektivan prikonsideron, kaj se ili estos trovantaj vian aprobon, bonvolu partopreni en la komuna laboro.

Miaj proponoj celas la purigadon de la lingvo, ĝian **naturan** polurigon kaj la kristalligon de la lingva spirito en la ĝenerala stilo. Ĉion ĉi certgrade jam havis nia lingvo, kaj ilin reakiri estas nepre bezono por la vivo kaj estonteco.

1. La Lingva Komitato kaj la Esperantista Akademio zorge elserĉu ĉiun neoficialan vorton el la du postmontaj verkoj de D-ro Zamenhof, el la Biblio kaj Originala Venkaro kaj oficialigu la trovitajn novajn radikojn. Tiamaniere ni travos Oficialan Radikaron kun ĉ. 5200—5300 radik- vortoj.

Post tiu ĉi oficialigo dum dek jaroj ne okazu oficialigo, nur zorga kontrolado.

2. La Esperantista Akademio kaj Lingva Komitato kiel eble plej rapide kompilu sian vortaron kun la titolo: **Oficiala Vortaro de Esperanto.** Tiu ĉi vortaro devus enteni ne sole la radikojn, sed ankaŭ ties aplikojn en kunmetaĵoj kun traduko en la ĉefaj naciaj lingvoj. Tiamaniere ni havus kompetentan vortaron kun ĉ. 15—18 mil oficialaj vortoj. Eldoniston por tia vortaro trovi ne estos malfacile.

La neoficialaj vortoj povos aperi en aparta volumo kun titolo: **Enciklopedio de la sciencoj kaj fakaj vortoj neoficialaj en Esperanto.** La eldono de tiu ĉi verko ne estas urĝa, ĉar provizore la Plena Vortaro de SAT bone servas por la celo.

3. Komprenible la leonan parton en la

purigado kaj kristalligo de la lingvo havus la literaturistoj verŝajne laŭ la oficiala vortaro kaj prefere formante la bezonatajn vortojn per la lingvaj elementoj ol per simpla alprenado de fremda nova vorto.

Estus dezirinde, se ĉiu verkisto almenaŭ unu verketon dediĉus al la legomaterialo de la komencantoj kaj en ĉiu libro li penadu resti en la oficiala kadro de la lingvo.

4. Ankaŭ la legantaro povus partopreni en la laboro per siaj rimarkoj, senditaj de tempo al tempo al la redakcejo de gazeto.

Estus dezirinde, se la legantoj bonvolus noti kiujn vortojn, kiujn ili ne trovas en la Plena Vortaro, ne konas iliajn signifojn aŭ dubas pri la ĝusta signifo de ĉi aŭ alia vorto. Per tio la literaturistoj povus kontroli sin aŭ revizii sian sintenon koncerne la kritikatajn vortojn.

Jen estas miaj proponoj. Kompletigi, pli-precizigi la laboron, fari detalan kaj sisteman skemon por plenumi la nefacilan taskon oni ja povas, eĉ estus tre bone, se nia grava problemo okupas la atenton de la lingvovozantoj.

Por ekzemplo pri la lingvopolurado mi aŭdus pri du manieroj, jam pli malpli suk- cese aplikataj en nia lingvo.

a) Por forigi kaj eviti la pseŭdosufiksojn (ĉinajojn) **-aci-, -ator-, -ik-, -iv-, -um-, -i-,** ktp. oni prenas nur la vortradikon. En la Pcezia Fakovortaro ni trovas ekzemplon: **erota, erupti, gimnasto, konversi, situi** ktp.

b) Por forigi la vortojn, mortintajn eĉ en la naciaj lingvoj, tamen uzatajn pro kutimo doni scian aŭ tre kleran karakteron al la parolo, oni provas krei vortojn el la origi- nalaj elementoj de la lingvo. **Neologismo = novigismo, novismo; agrikulturo = tek- kulturo; hidroterapijo = akvokuraco;** teĉto-

gio = discienco; politeisto = multdiano; poligloto = **multlingvulo;** ateismo = **sen- diismo;** biblioteko = **librarejo;** antropologio = **homscienco;** antropomorfa = **homforma;** galaksio = **laktvojo;** korepetitorio = **lern- helpanto;** aerolito = **aerŝtono;** apostrofo = **superkomo** ktp.

Ambaŭ manieroj estas aplikeblaj ĝis certa grado, ĝis limoj de la tuja komprenebleco kaj merindeco.

*

Esperable mi ne estos miskomprenata kaj niaj literaturistoj turnos sian atenton al la problemo, urĝa kaj grava, por trovi kon- tentigan solvon tiel por la evoluo de la lite- raturo kiel por la legantaro, kiu fine volas ne nur lerni, sed ankaŭ senĝene uzi kaj ĝui la lingvon, pri kiu la propagandistoj parolas vere allogge: „Esperanto estas lingvo, sim- pla, facila, belsona kaj oni povas lerni ĝin dum kelkaj semajnoj.“

Nia lingvo ne estas ludilo por multlingv- uloj, ĝi ne estas eksperimenta besteto por sekciado de reformemaj lingvistoj, sed ĝi estas nia animparto nobla, al kiu la idealis- mo de multaj miloj da primokitaj sinofe- antoj donis vivon por la bono de la tuta homaro. Hodiaŭ ĝi estas realaĵo, havanta propran spiriton lingvan, kiu meritas res- pekton de la uzantoj. Ni ne lasu detruji ĝin! Ni haltu sur la vojo danĝera kaj konsci- pri tio, ke ĝi kondulkus la lingvon al pereco, al plena disfalo, se ĝustatempe ni ne bridus la bonvolajn, sed certe troambiciajn reform- emulojn.

Nia literaturo respegulu la vivantecon de Esperanto kaj ne tiun de ĉiuj hindo-eŭropaj lingvoj. La propra vivo havas originalan ĉarmon; la pruntepetita spirito pravas mortantecon.

Fino.

Meguru Takahaŝi:

(Fino.)

Pri la refleksiva pronomo.

Jen vi eksciis, kiel D-ro Lippmann opini- as pri la nun pritraktata problemo. Kun bedaŭro mi devas tamen eldiri, ke alie mi opinias koncerne la kvaran paragrafon (mi lasu la unuajn tri kaj la kvinan al plŭpostaj diskutoj!).

Si meditas pri la vortoj de la patrino de ŝia lernantino.

Mi cente eraris, prenante „ŝian lernanti- mon“ por la subjekto de la ago esprimita per „la vortoj“; sed tio tute ne tuŝas la kernon de la problemo, ĉar oni povas ri- gardi „la patrino de ŝia lernantino“ entute kiel la subjekton de la ago „paroli“. **Re- fleksiva pronomo** estas menio alia ol **reapero do aganto pere de koncepto esprimanta agon.** El tio rezultas, ke la aganto ekzistas, poste estigas la ago, kaj sub la reganteco de la dua reaperas la unua vestiita per la refleksiveco. La refleksiva pronomo tial sin prezentas nur en la propoziciparto regata de la ago, sed neniam en la subjekta parto. El tio jam klariĝas, ke la ago esprimita per „la vortoj“ — paroli — ne estas kapabla decidi la uzadon de la refleksiva pronomo rilate al „la patrino de ŝia lernantino“. **Marta, meditante,** regas „la patrino de ŝia lernantino“, kiu parolas vortojn. Devus esti do: . . . pri la vortoj de la patrino de ŝia lernantino.

Maltrankvila fariĝis la bela Sara pro tiu spasmе sprucanta gajeco de ŝia edzo.

La samo validas eĉ pli klare por la Sara- frazo. La edzo de Sara estas la subjekto de la ago esprimita per la gajeco, kaj estas tute libera de ties influoj koncerne la re- fleksivecon. La bela „Sara“ estas la reg- anta substantivo ankaŭ por „sia edzo“, kiu siaparte parolas, ĝojas, babilas, ridas ktp. Do: . . . pro tiu spasmе sprucanta gajeco de sia edzo. Ni legu sango anstataŭ gaj- eco, kaj ni havos: Maltrankvila fariĝis la bela Sara pro tiu spasmе sprucanta sango de sia (kompreneble ne ŝia) edzo. Kia dife- renco estas inter ambaŭ frazoj? (La supra argumento estis presita en la Revuo Orienta XII 6.)

Mia konkludo, kiun vi ĵus legis, ne ŝajnas al vi nura produktajo de nematura logiko? Tion mi volas demandi, ĉar tiajn kulpiĝojn mi devis ricevi de la legantoj de La R. O. Nun mi konfesas, ke mia skribo cente estis tro logika, tro rigida; sed, atentu, mia kon- kludo ja ne estas ridinda iluzio de teorio; ĝi estas ja bazita sur la praktika lingvouzo. Jen mi citos kelkajn el multaj ekzemploj ĉe Zamenhof, kiuj sin prezentas kiel indaj atestoj por miaj diroj:

Boneco tro matura baldaŭ mortas de **ŝ' prem' de sia propra trofonteco.** (H. 139/15.)

. . . li vidis la trabliletadon de sia ruĝa sango. (F. II 22/39.)

. . . kongresoj internaciaj tuj povus komenci uzadi ĝin por la reci- proka komprenigado de siaj mem- broj. (F. K. 286/6.)

Doktoro Jeddler . . . ne povis sin deteni montri tian grandan intereson je la reveno de sia malnova lernanto kaj zorgato. (B. V. 42/28.)

Mi kredas, ke jam klarigis el la supremontritaj ekzemploj, kiuj preferas la Zamenhof-stilo, la pronomon refleksivan aŭ nerefleksivan. La frazoj de Sara kaj Marta estas solaj ekzemploj, kiuj parolas kontraŭ mia opinio. Nature do estiĝas la dubo, ĉu tie ne povas temi pri plum- aŭ preseraroj. Sed tio estas dubo necerta, kaj nenio pli. Sekve ankaŭ povas esti, ke D-ro Zamenhof skribis *ŝia* intence, kiel diras s-ro K. Ossalka en La R. O. XIII 8. Definitivan verdikton neniu rajtas doni, ĉar mia Majstro estas en la Dia Regno. Ĉiuokaze *sia* estas, al mi ŝajnas, multe pli natura, do multe pli preferinda ol *ŝia* el la vidpunkto de sencoldareco. *Sia* (antaŭ la tiel-nomata subjektiva „de“) estus metaŭga, se ne falsa, reapertiganto (refleksivo) de la subjekto de l' tuta frazo. Sed mi ne devas forgesi akcenti, ke mi tute ne nomas *sia* absolute erara, alie min turmentos liberalistaj protestoj, ofte histeriaj, ofte neurastenaj; jam longe mi scias, ke estas granda aventuro precipe en Esperanto, nomi tiun aŭ alian formon, ke ĝi devas esti tia kaj tia. Preferi *sia* al *ŝia* neniel karakterizas la lastan kiel gramatike eraran.

Ci-malsupre mi montras al vi, kiel D-ro Lippmann respondis al mia refoja demando:

Via difino: **Refleksiva pronomo estas repero de aganto pere de koncepto esprimanta agon** — estas ĝenerale bona. Eble ĝi ne taŭgas por ĉiuj kazoj, ekz. „La reĝo kun *sia* krono“ (III B5a).

Kial la principo de vi dirita instigu min, uzi *sia* en la citita frazo el „Marta“, mi ne komprenas. Mi nur tial diris, ke „Vortoj“ esprimas la agon „paroli“, por klarigi aŭ pravigi la Zamenhofan „*ŝia*“. Sed tio ne malhelpas, ke mi eble (same kiel vi) estus preferinta la refleksivan pronomon, ĉar estas tute ne necese, rigardi „vortoj“n kiel substantivon esprimantan agon. Se tion oni ne faras, la reganta substantivo estas *Marta*, kiu meditas, kaj laŭ II B5a oni devas diri: *Ŝi meditas pri la vortoj de la patrino de sia lernantino*.

Komprenable mi tute konsentas kun vi, ke — se en la Sara-frazo ni legus sango anstataŭ gajeco — mi nepre devus havi ankaŭ *sia* edzo, ĉar sango neniel povas esti rigardata kiel substantivo esprimanta agon. Rigardi kiel tian substantivon la vorton gajeco, komprenable nenio devigas min. Ankaŭ mi tion faris nur, por — kiel supre — klarigi aŭ pravigi la Zamenhofan „*ŝia*“. Mi ne hezitas, preferi kun vi en tiu frazo la refleksivan „*sia*“, kiu rilatas al la subjekto Sara.

Mi posedas du tekstojn de LA RABENO DE BAHARAĤ: 1) en LA REVUO VIII (1913/1914) p. 241 k. s. kaj 2) HEINE, LA R. DE B. SALOM ALEJHEM, LA GIMNAZIO Paris 1924. En la unua sur paĝo 247 linio 30, same kiel en la dua sur paĝo 13 linio 14 mi trovas „... gajeco de *ŝia* edzo“. Do vi devas havi alian tekston, skribante, ke mi „kredoble mistemoras, ke D-ro Zamenhof preferis en tiu okazo „*ŝia*“ ol (preferere „al“) „*sia*“, sed la puran malon oni trovas en la teksto“.

D-ro Lippmann aprobis mian opinion nur unufanke, lasante la formon *sia* ankaŭ uzbla per ag-karakteriza analizo de la gajeco kaj la vortoj. Ekzistas ankoraŭ granda fendo inter lia opinio kaj la mia! S-ro K. Ossalka publikigis sian apantan opinion en

La R. O. XIII 8, kiu mi prezentos ĉi-sube (La teksto estas japana).

— En la sekvantaj du ekzemploj ĉiulformo el *sia* kaj *lia* (aŭ *ŝia*) ne povas esti nomata eraro, ĉar tie minacas neniu ebleco de miskompreniĝo; alivorte la uzadon, decidas la sentoj de l' parolanto.

La varma suno lumis sur li kaj tra siaj delikataj fingroj, kiujn li tenis antaŭ sia vizaĝo, li vidis la trabrilatadon de sia sango. (F III 22.)

Ĉiam pli kaj pli maltrankvila fariĝis la bela Sara pro tiu spasmaj sprucanta gajeco de *ŝia* edzo. (Rn. 13, gajeco montrata = gajeco, kiu estis montrata de *ŝia* edzo.)

S-ro K. Ossalka permesas grandan elastecon kondiĉe, ke estu neniu antaŭsento pri erarkomprenoj en interkomunikado, parola kaj skriba, kio ŝajnas unuavide ŝatinda kaj etika, por liberigi la lernantojn el la rigidaj gramatikaj katenoj. Tamen troa libereco, ignoranta la faktorojn, kondukos al grava haoso de l' lingva sistemo. De li ne estas konsiderata la lumigo de kazoj, en kiuj oni povus ĝui la benatan elastecon; krome la kondiĉo de li metita estas preskaŭ sen-signifa, ĉar kontraŭ eventualaj miskomprenoj defendus perfekte la kontekstoj (aŭ la cirkonstancoj) en plimulte da okazoj! Senkondiĉa, sentima ekaperas la elasteco favorata de li! Ĉu tia elasteco fakte regas la lingvan praktikon? Se jes, oni devus renkonti ĉie kaj ĉiam tiujn maldiligentajn lernantojn, kiuj embarasus siajn instruistojn per uzaj pravigoj, ekz.: „Li (A) rompis la okulvitrojn de lia (de A) patro — estas korekta, ĉar la okulvitroj de lia patro estas la okulvitroj (posedataj) de lia patro.“ Bravaj (ankaŭ pravaj?) rediroj de la amindaj lernantoj!

S-ro Teo Jung skribis (per karto de 5.2. 1932) al mi kiel jene:

„Ŝi ne povis toleri la frostotremadon de ŝiaj infanoj“ — povas esti korekta, se temas pri la infanoj de alia virino; se temas pri la propraj infanoj, oni devas diri „*siaj*“. Tio estas tute klara kaj, laŭ mia opinio, tre simpla. Bedaŭrinde ĉe mi elĉerpiĝis la broŝureto de Lippmann, kaj mi ne povas konstati, ĉu „*siaj*“ eble estis nur preseraro.

Ĉu ne estas interese, ke la opinio de li estas sama kun la mia? Eĉ unu paŝon pli profunden ĝi estas irinta!

Nun mi lasu ĉi tiun problemon al la ĝenerala esplorado de la estimataj legantoj; volonte mi akceptos ĉies nudajn kritikojn.

Rim. 1. Mi trovis multe da pres- kaj plumeraroj en mia PRI LA UZADO DE „KIO“ KIEL RELATIVO (L. Kr. n-ro 1); ili estas tro klaraj, tuj troveblaj, tiel ke mi ne aperigas liston de iliaj korektoj.

2. Mi deklaras nuligitaj ĉiujn artikolojn (pri si kaj *sia*) aperintajn en La R. O., ili cedu siajn lokojn al ĉi tiu kaj al miaj sinsekve publikigitaj manuskriptoj sur L. Kr.

LINGVA TRIBUNO

Kondiĉa modo.

„Jam li ven us; sed jen . . .“ Ĉu „venonta estis“ ne estas pli ĝusta? Se oni uzinta estus veran kondiĉan modon, oni devus ja esti skribinta:

„Jam li veninta estus, se nenio okazinta estus; sed jen . . .“ Do la formo „venus“ ne estas mallongigo de l' priskribo per „se“.

En „Lingva Kritiko“ 4, artikolo: „Ĉu Esperanto diŝfalas en dialektojn“, mi trovas:

„Oni pretendis, ke tiaspecaj kreaĵoj est as nedaŭraj, ĉar artefarita lingvo estus entirata . . . kaj frakciig us“. Ci tie oni mia opinio devas diri: „estas, frakciigos laŭ oni“. Ci tie tute ne estas klara ia kondiĉo.

„Verdire vi dev us pripensi, ke . . .“

Ci tie -us- ŝajnas al mi pli ĝusta, ĉar oni povas aldoni: „se vi dezirus agi bone.“ Tamen oni kutimas uzi la formon „-us“ kvazaŭ pro ĝentileco, kaj ĉu estas ĝentile, opinii la deziron je bonkonduto nereala kaj do uzi la kondiĉan modon?

Resume: Ofte oni diras pri io okazonta estinta, sed ne okazinta, ke ĝi „okazus“. Tio verdire ŝajnas al mi bona rimedo por montri la neefektivecon de l' projektita faro aŭ de l' aserto (en la dua frazo ekzemple), aŭ almenaŭ ĝian necertecon (lasta frazo). Laŭ tiu ĉi principo frazoj kiaj la tri ĉi-supraj aŭ kiaj jenaj estus ĝustaj: „Tio povus almenaŭ“ — „Kion vi dirus?“ — „Laŭ li mi estus freneza“ — „Li diris ke mi venus baldaŭ“ (sed mi ne venis) — „Li diris ke mi venonta estas baldaŭ“ (kaj mi eble do jam venis). Sed ĉu la principo estas ĝusta?

F. J. B.

Stiefbruder.

(Vidu en L. Kr. n-ro 15.)

Kvankam mi estas kontraŭulo de ĉiu neologismo ne nepre necesa en Esperanto, mi tamen devas konstati vian pravecon rilate al „duonfrato“. Tiu vorto estas efektive du-signifa, sed ĝi ĝenerale sufiĉas por la ĉiutaga lingvo. Se vi volas diferencigi, sekvu la ekzemplon de la franca lingvo, kiu tute rilate ĉerpas el la latina.

Do, uzu „duonfrato“ por la germana „Stiefbruder“. Traduku „Halbbruder“ per „samsangulo“ aŭ „samsanga frato“ (france: frère consanguin, latine: consanguineus), se li havas la saman patron kiel vi, kaj per „samuterulo“ aŭ „samutera frato“ (france: frère utérin, lat. conuterinus), se li havas la saman patrino kiel vi.

A. Einig, Leubsdorf.

*

La „mal-vortoj“.

La „mal“-afero povas malesperigi onin. Nun eĉ Baghy nomas ĝin danĝera eksperimento, kvankam li mem uzas vortojn kiel ekz. „tempesto“ anstataŭ la sufiĉa, pli klara kaj ne pli longa „ventego“. Ĉu oni diru: „furioza tempesto disŝiris la maldikegan folion“?

Kial oni parolas pri danĝero, kvankam jam ekzistas rifuzi apud malakcepti, maldolĉa — amara, mallapera — foriĝi, roko — ŝtonego, ktp, ktp.?

La redaktoroj de gazetoj ne povas riski multon diri en tiu afero, ĉar la mal-amikoj tuj kriadus: „Krucum ilin!“; sed ĉu ne estus eble aranĝi interkonsenton de tiuj kompetentaj verkistoj, kiuj deziras enkonduki novajn radikojn por la trouzataj mal-vortoj, alie oni eble uzos por „malfermi“ tri novajn vortojn: „aperiti, ovri, urvri.“

Uvri ŝajnas al mi la plej taŭga, ĉar ĝi ne similas al aliaj vortoj kaj estas kurta (mallonga). Se kelkaj verkistoj ekuzas la saman kurtan vorton por „malfermi“, ĝi sendube rapidege enkondukigus malgraŭ ĉiuj kontraŭkrioj.

G. Sieche.

Ĉiun redakcian materialon por Lingva Kritiko

sendu al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo; sed la materialo por „Konslanta Gramatiko“, redaktata de s-ro Jung, estas sendota al lia adreso en Köln.